

Literatura Mondo : Naskiĝo kaj celo
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 627, 1975.10.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la aŭtunaj monatoj ni trafoliumos kun vi la gravegan revuon **Literatura Mondo**, kiun fondis en oktobro 1922 Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Paŭlo Balkányi, Paŭlo Lengyel, Adelberto Bayer kaj Teodoro Schwartz.

A.- La granda plimulto de la ĵus cititaj nomoj restis konata de la esperantistaro.

Cl.- La unua numero de **Literatura Mondo** komenciĝis, kiel decas, per alvoko « *Al la legantoj* » :

A.- « *Nakiĝis gazeto. Gepatroj, parencoj, konatuloj staras ĉirkaŭ la lulilo kaj penas, kun timema espero, diveni la sorton de la novnaskito. Alvenas D-ro Okulvitro kun venena krajonlanko en la mano, vestita per malbonhumoraj recenzmanuskriptoj kaj grumblante, ektirinta sian longan barbon, li diras : »*

Cl.- « *La infano ne estas vivkapabla, ĝi estas herede malsana, la gepatroj ja suferas je poeza malsano, je la Gazetfonda Febro.* »

A.- « *Gepatrojn, parencojn, konatulojn - kial nei – ekkaptas timo. Tamen, ili esperas. Ili atendas la venon de bona feino. Ili scias, ke la ĉarma Feino de l'Arto vagas senhejme tra la Esperanta mondo, kaj nur almoze ĝi ricevas lokon, por ripozi iom ĉi tie kaj tie. Ĉu ŝi ne ekkonos, ke nia infano dediĉis al ŝi sian tutan vivon? [...]* »

Cl.- En tiu ĉi enkonduko Kolomano Kalocsay memorigas, ke antaŭ la milito, kiu ilin pereigis, la revuoj *Lingvo Internacia* kaj *La Revuo* favoris dum ok jaroj la disvolviĝon de nia literaturo. Ili estis la unuaj organoj, kiuj havis lokon por beletro. Kaj li tiel priskribas la situacion en la ceteraj gazetoj. Vi rimarkos, ke tiu ĉi priskribo restis plene aktuala :

A.- « *En la ceteraj gazetoj la literaturo estas nur gasto [...] tre malriĉe regalata. [...] Longaj noveloj, eĉ poemoj ne povas aperi pro manko de loko. Oni vere embarasiĝas, volante ion traduki por Esperanta gazeto : oni ja volas traduki nur ĉefverkojn, verajn perlojn, sed la limoj difinitaj de la gazetoj estas konvenaj nur por mallongaj skizoj. [...] Mi estas konvikiĝinta, skribas Kalocsay, ke la nekompreneblan materialmankon de kelkaj gazetoj kaŭzas ne la mallaboremo de la kunlaborantoj, sed ĝuste la malvastaj limoj difinitaj, kiuj tre malfaciligas la serĉon de konvena literaturaĵo. Sama estas la afero pri recenzoj. Recenzon nepre bezonas ĉiu literaturo. Sen la valormezuranta kontrolo de la kritiko ĝi degeneras, pereas. Kaj kio estas la eterna rekantaĵo en la recenzoj ? « La verko meritu ja... ktp. ktp... sed la manko de loko... » Same pri disertacioj pritraktantaj lingvon, belarton, beletristikon, muzikon, ktp. Ĉie kaj ĉie la manko de loko. [...]* »

Cl.- Kolomano Kalocsay tiel priskribas la celon de la nova revuo **Literatura Mondo** :

A.- « *Doni lokon por ĉiu valora verko originala aŭ tradukita, ke fine, forlasinte la ŝimajn tirkestkarcerojn ili venu en la sunlumon. Varbi ĉiujn talentajn verkistojn, eble eduki novajn, fariĝi la centro de la literatura mondo Esperantista. Mallonge : ni volas krei la literaturan gazeton, kiun ni bezonas. Specialan programon krome ni ne donas. Ĉio rilata al ĉiuj specoj*

de l'arto trovos ĉe ni lokon. Ĉu malnovmoda, ĉu moderna aŭ supermoderna – al ni estas egale – se ĝi estas verko interesa kaj valora. »

Cl.- Tiun ĉi celon atingis la fondintoj. Ĝis la dua mondmilito, kaj malgraŭ multaj financaj malfacilaĵoj, la revuo **Literatura mondo**, kiu estis eldonata en Budapeŝto, nelacigeble publikigis verkojn originalajn aŭ tradukitajn, recenzojn, kritikojn, debatojn, raportojn, ktp. Ĉirkaŭ **Literatura Mondo** formiĝis vera skolo, kiun la historistoj nomas la **Budapeŝta Skolo**. Post la dua mondmilito neniuj organoj simila al **Literatura Mondo** kapablis renkontigi la verkistojn kun la publiko. Pro tio multe malpli viglas la esperanta beletro nun, ol dum la intermilita periodo.

A.- La rolo de **Literatura Mondo** estas nekompareble pli granda, ol la eldonnombro de tiu ĉi revuo, kies legantaro malfacile kreskis. La ripetitaj varbalvokoj de la redakta komitato restis vanaj, apenaŭ 300, maksimume 500 personoj en la mondo abonis la revuon, kiu tamen ne mortis pro la neeviteblaj deficitaj, kiujn la redaktoroj malavare mem pagis, esperante, ke foje mon-subtenon alportos la naciaj kaj internaciaj organizaĵoj esperantistaj. Sed la naciaj kaj internaciaj organoj, pro manko de loko, eĉ ne konvene recenzis la naskiĝon de **Literatura Mondo**, kaj poste nur supraĵe raportis pri la aktiveco kaj eldonaĵoj de la Budapeŝta Skolo.

Cl.- Kiel konstatis Kolomano Kalocsay en sia alvoko al la legantoj « *La popolo Esperantista ne estas ankoraŭ matura por subteni literaturan gazeton, ĝi interesiĝas nur pri poŝtkart-interŝanĝadoj, kabaredoj, ekskursoj, maksimume pri io-ujo-bataloj.* » (Fino de la citaĵo.) Tamen **Literatura Mondo** sufiĉe longe vivis, kaj dank'al tiu ĉi revuo Esperanto akiris dimension, kiun neniuj aliaj planlingvaj projektoj povis konkurenci.

A.- Dum la venontaj elsendoj ni raportos pri tiu epokfara rolo de **Literatura Mondo**.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!